# komunikoj

JARO 37-a | APRILO - MAJO - JUNIO | N-ro 146 2012


"Amu vian Dion per via tuta animo kaj vian proksimulon kiel vin mem."

Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

## Centjariĝo de Esperanto-kursoj ĉe la Brazila Spiritisma Federacio



De maldekstre, José Passini, Affonso Soares, Nestor João Masotti, Lício de Almeida Castro kaj Waldir Silvestre.

Brila kuniĝo de koroj en etoso de amo kaj frateco estis la signo de la kunveno, per kiu la Brazila Spiritisma Federacio – BSF, en la 20ª de Majo 2012, memorfestis la centjariĝon de siaj senpagaj kursoj de Esperanto, komenciĝintaj en la 3ª de Majo 1912.

La eventon, okazintan en la Centra Sidejo de BSF en Braziljo, ĉeestis ĉirkaŭ 80 personoj, el kiuj multaj venis de aliaj brazilaj ŝtatoj.

Ĝin prezidis la prezidanto mem de la Institucio, S-ro Nestor João Masotti. Ĉe la labortablo sidis D-ro Waldir Silvestre, prezidanto de la Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj – BAES, D-ro Lício de Almeida Castro, prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo – BEL, Prof. D-ro José Passini, el la movadoj esperantista kaj spiritista de la urbo Juiz de Fora, MG, kaj S-ro Affonso Soares, direktoro de la Departemento de Esperanto de la BSF.

Neide Barros Rego, kiu ravis ĉiujn per sia sento-plena declamado kaj kanto, estis akompanata de la duo Dolce Corde, kiu ankaŭ ludis plej dolĉajn muzikojn kaj akompanis alian brilan, tre junan kantistinon.

Al la ĉeestantoj estis disdonataj ekzempleroj de la libro *Kio estas Spiritismo?*, de Allan Kardec, krom flugfolioj kun la tekstoj de la Himno de Esperanto, la poemo La Espero, de L. L. Zamenhof, dufoje kantita en la kunveno, kaj de la mediuma mesaĝo La Misio de Esperanto, diktita de la Spirito Emmanuel al Chico Xavier. Krome, al la ĉeestantaj reprezentantoj de institucioj estis donita po unu ekzemplero de la libro *Eu e Roberto de Canallejas – Um caso de reencarnação*, de Yvonne A. Pereira, ĝentile donacitaj de la Eldona Spiritisma Asocio F. V. Lorenz.

Portretoj de eminentaj esperanto-instruistoj de la brazila esperantista movado konsistigis belan ekspozicion en la enirejo al la salono, kaj en la sama loko BEL starigis riĉan ekspozicion de esperantaj libroj.

La krono de la evento estis la prelego de Prof. José Passini pri Esperanto, Zamenhof kaj ties idealoj.

Varman gratulon ni esprimas al la Brazila Spiritisma Federacio pro tiel bela kaj signifoplena dato!

Affonso Soares

## SPIRITISTA JUNULARO APOGAS ESPERANTON

GRUPO DE ESPERANTO PAC-HORO, 26 jara, ĉiujare organizas prelegojn ĉe Spiritismaj Centroj, precipe al niaj karaj junuloj. Ĉijare ĝi okazigis kvar prelegojn pri la temo “La Spiritista Junulo Volas Scii”, kiam la gefianĉoj Alexandre Machado kaj Érika Ueoka prelegis en la duaj unuaj kunvenoj, kaj aliaj kvar samideanoj, Rinaldo Galindo, Bruno Maciel, Robinson Mattos kaj Diego Lyra, en la du lastaj, respondis diversajn demandojn de la junuloj, precipe pri la spertoj de tiuj samideanoj en Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri multaj aliaj nuancoj de la esperantista movado.

Gratulojn al Grupo Pac-horo pro la 26-a datreveno kaj pro la energia laborado kaj fekunda semado por nia Afero!



## ESPERANTO TERAPIO

En la urbo Volta Redonda – RĴ – Brazilo – komenciĝis je la 4ª de aprilo, nova kurso de Esperanto, ĉe la palaca sidejo de “Centro de Prevento de malsanoj por maljunuloj”, fako de la granda “Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj” de tiu industria urbo. Tie la lernado de Esperanto oni konsideras tre valora helpo por ekzerci la menson kaj aktivigi la neŭronojn; kaj ankaŭ utila okupa terapio kiu pli bonigas la memestimon, riĉigas la socian vivon kaj forigas la sensacion de izoleco kaj depresion. La psikologoj kaj kuracistoj opinias ke la lernado de Esperanto estas tre valora por la konservado de la korpa kaj anima sano.




Alberto Flores

La fotografaĵo montras la gelernintoj kiuj partoprenis en la E-Kurso dum 2011. En la unua vico, sidante, estas la instruintoj Inĝenieroj V. Werneck kaj A. Flores; ĉe la centro, kun nigra vestaĵo, estas ŝ-ro Johano Rodrigues, la kreinto de E-Kurso.

## IMITINDA EKZEMPLO!

Samideano Milorad, el Serbio, estas unu el la plej aktivaj Lorenzanoj en la mondo kaj donas al ni gravan ekzemplon pri la diskonigo de niaj verkoj, kiel ekzemple nia bulteno “Komunikoj”: li ĝin kopias kaj disdonas al pluraj samideanoj el diversaj landoj, precipe en Eŭropo. Sen ia dubo, estas imitinda ekzemplo! Nome de nia Estraro, ni vin gratulas kaj dankas, kara Amiko!





## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE

# F. V. LORENZ

Dom Feliciano, Rio Grande do Sul, la 11an de Oktobro 1948.

Tre estimata Samideano, sr° C. N. Blaschikoff:

Elkorajn salutojn!

Respondante Vian ŝatatan leteron de la 27ª de Septembro lasta, mi sendas al Vi ĉikune naŭ poeziaĵojn, nome: tri sonetojn miajn kaj ses tradukaĵojn, inter ili ankaŭ la versojn de K. Bal...: "Zavjét bytijá...

Nun mi estas tre okupita, ĉar mi preparas kelkajn gejunulojn por ekzamenoj de eniro en gimnazion. Poste mi preparos (tiel mi esperas) novajn poeziojn aŭ aliajn artikolojn. Mi kunlaboras ankaŭ por la revuo "Esperantista" en Praha, Ĉeĥoslovakio, (Praha XIX, Uralské námestí 9).

Dezirante al Vi sanon kaj feliĉon, mi salutas ankaŭ la samideanojn de "Rio Esperantista", kaj restas.

Via sincera amiko,

*Lorenz*

* * *

Al srº ISamel Gomes Braga, Rio.

D. Feliciano, R.G. Sul, 23/8/1942.

Estimata Samideano kaj Frato:

Salutante Vin kaj la Viajn, mi resendas al Vi, la reviziitajn, la foliojn 191 – 216, de Via traduko.

Mi esperas ke la antaŭ unu semajno senditaj paĝoj 164 – 190 estos jam en viaj manoj, kiam ĉi tiuj alvenos.

En mia lasta letero mi skribis erare "edzo" anst. "edzino"; pardonu mian distrecon. La sciigo pri la milito igis min ree pensi pri la nuna situacio monda. Ĉiutage mi preĝas ke DIO mallongigu la tagojn de la terura hombuĉado.

Kun sinceraj bondeziroj, mi restas.

Via frato,

*Lorenz*



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE

# ZAMENHOF

Al s-ro R. en Moskovo 1889

Sinjoro B. estante ankoraŭ en Varsovio havis ĉiam la kutimon paroladi "ni laboris", "ni faris" kc. sed efektive li absolute nenion ankoraŭ faris, li ne alportis anakoraŭ eĉ unu novan amikon al nia afero, kaj eĉ sian propran "promeson" li ankoraŭ ne elsendis. Mi ripetas, ke ĉiu kiu ne faras al si en la fino de ĉiu monato la demando "kiom da novaj amikoj mi alportis al la afero", tiu ne povas sin nomi amiko laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone ellernis la lingvon.

*Z*

Al s-ro J. L. en Bielaja Cerkov 1889

Ĉu vi jam komencis la presadon de via lernolibro? Se vi ne scias, kiam vi devas uzi la formon "la" kaj "l", uzu ĉiam pli bone la formon "la". La formon "l" mi uzas ordinare nur post prepozicioj, kiuj finaĝas per vokalo (ekzemple "de", "tra" k,c.); en ĉiaj aliaj okazoj mi uzas ordinare la plenan formon "la", ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, en la sono ne agrabla.

*Z*

Al s-ro M. en S Petersburg

Via energia laborado estas tre laŭdinda, sed via faremeco estus multe pli utila por nia afero, se Vi uzus ĝin en alia maniero. Anstataŭ la personoj, kiujn Vi gajnis por nia afero kaj kiuj nenion faras, estus pli utile se Vi povus gajni unu aŭ kelkajn riĉulojn, kiuj volus ion fari por nia afero. La plej bedaŭrinda fakto en nia afero estas tiu, ke ni ne havas ankoraŭ inter niaj amikoj eĉ unu riĉulon, kiu povus kaj volus ĝin subteni. En nia tempo sen rimedoj materialaj ĉia afero povas progresi nur tre malrapide, kaj ĉiu paŝo kostas doloron kaj suferon.

*L.Z.*

Eĉ se ni mem volus haltigi la movadon, ni jam ne povus, ĉar homoj de plej malsimilaj kredoj, partioj, klasoj, jam laboras el la tuta koro por Esperanto, kaj interkonsento por halti jam ne estas ebla".

*Ismael Gomes Braga*

Unu el la plej pereigaj iluzioj de la homo estas la supozo, ke la morto nuligas la konscion pri la individueco.

Opiniante, ke la intelekta funkcio estas ekskluziva de la encefala maso, kaj ke la Animo aŭ Spirito ne povas ekzisti aparte de la korpo, multaj konkludas, ke tondo de la fadeno de la materia vivo signifas definitivan estigon de la homo, neniigon, en la entomba putrado, de ĉiuj sentoj kaj ideoj karakterizantaj iun ajn personon.

Tio estas la malĝojiga kaj terura trompiĝo de la sinmortiginto.

Jen, kara leganto, se vi volos koni aliajn detalojn pri la temo, petu vian senpagan ekzempleron kaj kun granda ĝojo ni tuj ĝin sendos al vi.

eldonejo_lorenz@uol.com.br





## IMITINDAJ EKZEMPLOJ!



Jen du belaj momentoj kie la brazila samideanino Joana Pimentel montras la praktikan efikecon de nia amata lingvo. Joana kaj Telma ĉiĉeronis, en Rio, du eksterlandajn samideanojn. Detalo: la ĉina amiko nur parolas la ĉinan kaj Esperanton. Laŭ Joana, ili konversaciadis, nur en Esperanto, 21 horojn. Ili tre ŝatis la viziton al Brazilo kaj promesis tuj reveni por pli bone koni la Mirindan Urbon. “Ni ne bezonas lerni la ĉinan, portugalan aŭ finnan lingvojn por kompreni unu la alian, sufiĉas nur Esperanton: simpla, neŭtrala kaj efika”, konkludis Joana.

Alia interesa momento estis la vizito de Joana al Grupo de Esperanto, en la urbo Pedro Leopoldo, kies respondeculo estas la simpatia amiko Alberto Minardi. Joana partoprenis la lecionon, respondis diversajn demandojn kaj petis al Minardi por paroli al la gelernantoj pri la graveco de Esperanto ĉe spiritismaj domoj kaj ankaŭ en la spirita mondo.

Karaj, se vi havas informojn pri la agoj de niaj samideanoj en la spiritisma movado, sciigu nin kaj kun plezuro ni ilin aperigos sur la paĝoj de “Komunikoj”.

eldonejo_lorenz@uol.com.br




### Al amikoj de Lorenz

Estimata ano de Lorenz, ni petas komplezon: kiam vi deponos la pagon de la jarkotizo al nia Eldonejo, bonvolu nin sciigi, ĉar multaj same tion faras kaj ni ne sukcesas identigi de kiu estas la depono.

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, estas la horo; se vi ankoraŭ ne aliĝis, petu vian aliĝilon kaj helpu nin pri la disvastigo de Spiritismo tra la tuta mondo, kaj sciu kion vi ricevos en la komforto de via hejmo.

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**

Rua Francisco Vale, 57, Engenheiro Leal
Rio de Janeiro CEP 21370-171

Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>